

Estis interfluo en ambaŭ landoj

MORIWAKI Yasumasa

Ĉi-jare Universala Kongreso de Esperanto okazos en Nederlando, kaj mi supozas, ke japanaj esperantistoj volas pli multe scii rilaton inter Japanio kaj Nederlando. La urbo Nagasaki havas tre specialan rilaton kun Nederlando. Ĉar mi loĝas en Nagasaki, la redaktanto de *La Revuo Orienta* petis min skribi artikolon pri tio. Mi skribis kun la helpo de esperantistoj en Nagasaki.

1. Kial nur nederlandanoj en Edo-epoko?

En 1543 portugala velŝipo aldrivis al la insulo Tanegashima en la gubernio Kagoshima kaj de tiam komenciĝis la nova historio de Japanio havanta kontakton kun Eŭropo. En 1549 Francisko de XAVIER, portugala misiisto, venis al la urbo Kagoshima. Tiuj portugaloj ege propagandis kristanisman, kaj komence la regantoj akceptis tion, sed en 1612 la japana registaro en Edo (Tokio) deklaris malpermeson de kristanismo kaj decidis ekzili ĉiujn misiistojn. Male, nederlandanoj, kiuj venis al Japanio pli poste ol portugaloj, ne propagandis sian religion kaj havis intereson nur pri internacia komerco. Tial estis permesite al ili veni al Japanio.

El kvin velŝipoj, kiuj ekiris de Nederlando la 27an de julio 1598, nur unu velŝipo “De Liefde” povis alveni al la urbo Sashiu en la gubernio Ooita la 19an de aprilo 1600. Tio estis la unua renkontiĝo de nederlandanoj kun japanoj. En 1602 Nederlando establis VOC (la Unuiĝinta Orientinda Kom-



Dejima en
poŝtmarko
emisiita en
1999

panio) kaj en 1609 estigis sian oficejon en la urbo Hirado en la gubernio Nagasaki. En 1639 la registaro en Edo permesis, ke nur Nederlando kaj Ĉinio faru internacian komercon kun japanoj. Kaj en 1641 nederlandaj komercistoj estis transloĝigitaj al Dejima (deĵima), artefarita malgranda insulo en Nagasaki, kaj en ĝi loĝis nederlandanoj kaj japanaj oficistoj, kiuj kontrolis ilin. Pro ĉi tiu fakto Japanio havis meriton “gajni freŝdatajn informojn pri Eŭropo”, kaj Nederlando havis meriton “havi grandan profiton aĉetante arĝenton kaj argilaĵojn”. En tiu tempo Japanio produktis trionon da arĝento en la tuta mondo.

2. Influo de Nederlando en Edo-epoko

La oficioj de la ŝipo “De Liefde”

estis bonvenigitaj de la registaro en Edo. William ADAMS, kiu informis al la reganto TOKUGAWA Ieyasu pri internacia afero en Eŭropo, estis grave dungita. Li havis eĉ japanan nomon MIURA Anjin kaj lia tombo troviĝas apud la stacidomo “Anjinzuka” sur la linio Keihin-kyuukoo en la gubernio Kanagawa. Kaj Jan Joosten VAN LOODENSTEIJN, ĉefo de artilerio, loĝis en Edo, nuna Tokio. Lia loĝejo estis nomata Yaesu kaj nun tiu nomo restas en la stacidomo Tokio kiel Yaesu-guchi (elirejo Yaesu). Pro tio la stacidomoj, “Tokio” kaj “Centra Amsterdamo” fariĝis ĝemelaj stacidomoj.

En Dejima en Nagasaki nederlandanoj faris internacian komercadon dum 218 jaroj de 1641 ĝis 1859, kaj pli ol 700 nederlandaj ŝipoj venis al tiu insuleto. Dejima ludis esencan rolon kiel la malfermita sola fenestro al la Okcidento, tra kiu novaj scioj kaj kulturoj eniris en Japanion. Kiam Napoleon konkeris Nederlandon en la jaro 1810 kaj Nederlando malaperis el la mapo dum kelkaj jaroj, la nederlanda standardo ankoraŭ flirtis sur Dejima, sola en la mondo.

Ankaŭ eŭropa medicino estis alportita al Japanio de nederlandanoj. Fama japana kuracisto SUGITA Genpaku tradukis nederlandan medicinan libron *Ontleedkundige Tafelen* en la japanan kun la titolo de *Kaitai-shinsho* en 1774, kies originalo estis la germana *Anatomische Tabellen*.

Germana kuracisto Philipp Franz B. von SIEBOLD estas bone konata en Japanio. Li venis al Dejima kiel ku-

racisto en 1823. Dum sia restado li esploris multe pri Japanio, kaj reveninte hejmen, li verkis serion de 7 dikaj libroj *NIPPON* (Japanio) pri tiamaj diversaj aferoj pri Japanio kaj aliajn librojn pri japanaj animaloj kaj plantoj. Li eĉ nomis novspecion de hidrangeo *Hydrangea Otakusa*, ĉar karesnomo de lia japana edzino estis *Otakisan* (oficiala nomo estis KUSUMOTO Taki)

3. Nederlando en nia ĉiutaga vivo

1) nederlandaj vortoj en la japana

Ĉar nederlandanoj alportadis multajn eŭropajn aĵojn al Japanio dum multaj jaroj, ne malmultaj nederlandaj vortoj eniris en la japanan lingvon. Mi skribos tiujn vortojn japane, nederlande kaj Esperante.

BURIKI (blik, lado)
 PENKI (pek, farbo)
 INKI (inko, inko),
 RAKETTO (raket, rakedo)
 KONPASU (kompas, kompas)
 PONPU (pomp, pumpilo)
 RENZU (lens, lenso)
 RETTERU (letter, etikedo)
 YOTTO (jacht, jakto)
 BISUKETTO (beschuit, biskvito)
 HAMU (ham, ŝinko)
 CHOKORETO (chocolade, ĉokolado)
 KOHI (koffie, kafo)
 BIRU (bier, biero)

2) “Haustenbosu”

Al multaj japanoj venas bildoj de ventumiloj kaj tulipoj, kiam ili pensas pri Nederlando. En la gubernio Nagasaki troviĝas bela por-ripoz-urbeto “Hausten-

bosu” (nederlande Huis Ten Bosch, Esperante Domo de arbaro), kie estas re-produktita nederlanda urbo kun domoj, kanaloj, ventumiloj, tulipoj kaj aliaj. Tie oni povas vivi kvazaŭ en Nederlando.

3) Anne FRANK kaj Audrey HEPBURN

Multaj japanoj amas legi la libron *Taglibro de Anne Frank*. Anne vivis en Amsterdamo kaŝante sin sub la naziisma reĝimo. En la gubernio Hyogo estas Roz-preĝejo de Anne kaj oni povas ĝui rozojn donacitajn de ŝia patro en 1972.

Multaj japanoj scias ankaŭ kinaktori-non Audrey HEPBURN, kiu naskiĝis en la sama jaro kiel Anne FRANK kaj loĝis en Nederlando en la sama tempo.

4) Pentristoj

En Nederlando multaj famaj artistoj naskiĝis, ekzemple REMBRANDT Harmenszoon van RIJN, Vincent van GOGH kaj Johannes VERMEER. Tiuj artistoj tre plaĉas al japanoj, precipe van Gogh, kiu estis ege influita de japana gravuraĵo “Ukiyoe (ukijo)”, kiu estis importita kun argilaĵoj en Edo-epoko. Lastatempe Johannes VERMEER fariĝis fama en Japanio pro siaj malmultaj tre belaj bildoj.

4. Por la amikeco inter Japanio kaj Nederlando

Ekde la jaro 1600 Japanio havis tre amikan rilaton kun Nederlando krom kelkaj jaroj dum la Dua Mondmilito. Kiam la milito okazis japanflanke en 1941, la japana armeo atakis Indonezion, nome nederlandan armeon, kiu gardis sian kolonion Indonezion, kaj militkaptis multajn soldatojn kaj civi-

tanojn. Ili devis travivi tre severan, ofte kruelan, traktadon de japanaj soldatoj. Poste iuj estis translokitaj en Japanion, kaj suferis pro la atombombo al la urbo Nagasaki en 1945. Estas tre bedaŭrinda afero, ke la spuro de tiu tragedio ankorau ne estas tute forviŝita.

Ĉar en la jaro 1600 unuan fojon nederlandanoj venis al Japanio, en 2000 oni festis la 400-jaran datrevenon pri la amika rilato inter la du landoj. En Nagasaki okazis tre granda evento nomata “Nagasaki – Nederlando, Jaro 2000”. En ĉi tiu evento kronprincinoj de Japanio kaj Nederlando venis al Nagasaki kaj salutis por plia amikeco.



poŝtmarko celebranta 400-jariĝon de amika rilato inter Japanio kaj Nederlando, emisi-ta en 2000

Japanio havas specialan amikan rilaton kun Nederlando pli longe ol ĉiuj aliaj eŭropaj landoj. Mi esperas, ke japanaj partoprenontoj en la 93a UK en Roterdamo, havante konon pri la rilato inter ambaŭ landoj, akcelu plian amikecon kaj havu fruktoplennan sperton en Nederlando.

日本とオランダの関係について

(盛脇保昌, 長崎)